

ISSN 1056-0297

Usona **Esperantisto**★

Dumonata bulteno • *Bimonthly bulletin* • Vol 47, N° 5 (2008/5)



Esperanto, la edz-peranto (vidu p. 4)

Ankaŭ ĉi-numere: Nova retbutiko kaj diskutgrupoj • LK 2009 okazos en Sankta-Luiso • Kiel instrui transitivecon? • Vojaĝraportoj de Lusi HARMON kaj Joel BROZOVSKY • defio el *Tristam Shandy* tradukita • Protokoloj de LK 2008 • *La mirinda rakonto de la bitum-pupo* • kaj pli...

Usona Esperantisto

Dumonata bulteno • *Bi-monthly bulletin*

Redaktoro • *Editor*: HOSS FIROOZANIA

Sendu kontribuojn al • *Send contributions to:*

✉ Usona E-isto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

✉ bulteno@esperanto-usa.org

Redaktofino por la venonta numero • *Editorial
deadline for the upcoming issue:*

la 15-a de Novembro 2008

★★★

Ni bonvenigas kontribuojn en aŭ Esperanto aŭ la angla lingvo. Bonvolu inkluzivi viajn plenan nomon, foton kaj (ret)poŝtadreson. Sendante fotojn, nepre informu nin pri la nomoj de kaj la fotinto kaj la fotito(j) kaj la loko kaj dato. Ni ne perpoŝte resendos materialojn, krom se vi inkluzivos mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn el tiu ĉi bulteno, kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj sendu al la redakcio ekzempleron de la republikigita materialo. Opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas al la aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas la vidpunktojn de Esperanto-USA aŭ la redaktoro.

We welcome contributions in either English or Esperanto. Please include your full name, photo, and email and/or postal address. With photos please include the name of both photographer and subjects, along with location and date. Materials will not be returned by mail unless you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content from this bulletin if you give credit and send us a copy of the reprinted material. Opinions expressed here are those of the authors and do not necessarily reflect the views of Esperanto-USA or the editor.

★★★

Centra Oficejo • Central Office of Esperanto-USA

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA

☎ 510.653.0998; 2510.653.1468

✉ info@esperanto-usa.org

http://esperanto-usa.org

Direktoro • Director, CO: William B. HARRIS

Prezidanto • President: Philip G. DORCAS

Vicprezidanto • Vice President: Tim WESTOVER

Sekretario • Secretary: Julie SPICKLER

Kasisto • Treasurer: Anna BENNETT

Aliaj estraranoj • Other board members:

Joel AMIS, Ĵenja AMIS, Trevor ANDREWS,

Mar CARDENAS, D. Gary GRADY, Anjo HARLOW,

Lusi HARMON, Ros HARUO, Christopher ZERVIC

Kion (kaj kiel) kontribui?

Bonvenon al la iomete novaspekta bulteno de Esperanto-USA! Ĝi nun havas novan, propran nomon, kiu espereble bone spegulas ke ĝi estas kaj por kaj pri vi—la usona movado.



Hoss FIROOZANIA

ĝoje redaktas la *Usonan Esperantiston* (foje helpe de kolomboj). Por fari ĝin pli interesa kaj informplena, li bezonas **viajn** kontribuojn!

bulteno@esperanto-usa.org

Kiel kutime, mi instigas vin kontribui. Ĉu vi lastatempe aĉetis interesan libron aŭ KD-on de la libroservo? Nu, verku mallongan recenzon! Ĉu vi volas prikomenti ion, kion vi legis en antaŭa numero? Sendu al ni leteron! Ĉu vi uzis Esperanton por vojaĝi, aŭ por gastigi vojaĝanton? por festi kun samurbanoj? kiel temon en viaj studoj? Nu, sendu raporteton—kaj se eble, fotojn! Se vi havas ideojn pri plibonigoj, aŭ pri eblaj kontribuoj aparte longaj, bv. kontakti min, kaj ni diskutu. Mi avide kaj feliĉe bonvenigas proponojn.

Pri eblaj kontribuoj, jen kelkaj konsiloj:

- Elektronikaj materialoj estas multe pli oportunaj ol paperpoŝto. Ambaŭ estas bonvenaj, kompreneble... sed se vi havas ambaŭ, prefere sendu la elektronikan.
- Mi ĉiam serĉas interesajn tradukojn, sed prefere el fontoj ne jam facile haveblaj al ni usonanoj. Do plej bonaj estas tradukoj el lingvoj *krom* la angla, se eble.
- Plej urĝe bezonataj kontribuoj: recenzoj, fotoj, kaj desegnoj. Ĉu vi estas artisto? Bonvolu verki artaĵojn por la *Usona Esperantisto*!

Mi esperas, ke vi ĝuos ĉi tiun numeron. Agrablan legadon!

We need you! Your membership fees help us promote Esperanto and provide services to speakers and students across the country. Members receive our bi-monthly magazine, the *Membership List*, discounts from the Book Service, access to online resources (mailing lists, blog space, etc.) and a discount at the national convention. Please join (or renew) today!

Return this form with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: _____

Address: _____

City & State: _____

Postal code & Country: _____

Phone & Fax: _____

E-mail: _____

Birthdate (M/D/Y): ____/____/____ Ham radio call: _____

Don't allow other members to see my: address phone fax email

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Check **one** category of membership/support:

Life (*birthdate required*)..... \$800.00

Sustaining..... \$80.00

Family..... \$60.00

Individual..... \$40.00

Youth (*you must be under 27*)..... \$20.00

Limited Income..... \$20.00

Friend of Esperanto..... \$10.00

(*not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter*)

Credit card info: Visa Mastercard

Number: _____ Expires(M/Y): ____/____

Baldaŭ venos nova retbutiko!

Kvankam la retbutiko de Esperanto-USA havas grandan stokon de interesaj libroj, revuoj kaj aliaj varoj, ĝia aspekto estas iom konfuza kaj eksmoda.

Pro tio, Tim WESTOVER kaj Steve BREWER elektis novan retbutikan programaron, kiu nomiĝas 'Zencart'. Ĝi estas libera, senkosta (angle: *open source*) sistemo, kiu bone servos kiel la retbutiko de Esperanto-USA post iom da fasonado.

Laŭplane, la nova retbutiko estos atingebla iam en Oktobro. La direktoro de la CO, Bill HARRIS, anoncos ĝin en la retlistoj por membroj kaj en venonta numero de *Usona Esperantisto*.



Did you get your membership list?

The membership list was sent to every member of Esperanto-USA in late August. If you have not received it by now, please contact Bill Harris at 510-653-0998 or esa@esperanto-usa.org and he will send you a copy.

If you have received the list, please look it over and send any corrections or proposals for improvements to the Central Office.

Due to an error, family members were not included in the list. All the information for these family members plus any other corrections will be published as a supplement in the upcoming issue of *Usona Esperantisto*.

If a family membership is purchased and two names are supplied, both family members should receive a membership card and both should appear separately in the membership list. In the past, family memberships have appeared as "John and Mary Smith" or "Family Smith", but often family members have different last names, and in any case both people deserve their own entry.

—Bill HARRIS, Central Office

Pri la novaj diskutgrupoj

Esperanto-USA starigis kvar novajn diskutgrupojn ĉe "yahoogroups" pro tio, ke la malnovaj havas la nomon (ELNA), kiun ni ne plu uzas. Kiel antaŭe, la retlistgrupoj temas pri anoncoj, gvidantoj, libroj, kaj la ĝenerala listgrupo por membroj.

Ni invitas vin membriĝi en ĉi tiujn novajn listgrupojn, kaj partopreni en la agadoj de Esperanto-USA!

La novaj listgrupoj estas jenaj:

1. **esa-anoncoj@yahoogroups.com** estas por legi oficialajn anoncojn de Esperanto-USA. Uzu ĝin anstataŭ la malnovan (elna-anoncoj@yahoogroups.com).
2. **esa-gvidantoj@yahoogroups.com** estas por la estraro, komitataj estroj, komisiitoj, ktp. Uzu ĝin anstataŭ la malnovan (elna-estraro@yahoogroups.com). En la nova listo, membroj de Esperanto-USA rajtas membriĝi kaj legi, sed nur la gvidantoj rajtas sendi mesaĝojn. Notu, ke tio estas nova politiko, per kiu la estraro de Esperanto-USA klopodas esti pli malferma kaj videbla en niaj diskutoj kaj planoj. Ankaŭ la arkivo de la listo estos legebla al membroj de Esperanto-USA.
3. **esa-libroj@yahoogroups.com** estas por legi anoncojn pri la libroservo. Uzu ĉi tiun listgrupon anstataŭ la malnovan (elna-libroj@yahoogroups.com).
4. **esa-membroj@yahoogroups.com** estas vera diskutgrupo, en kiu membroj de Esperanto-USA rajtas sendi mesaĝojn. Uzu ĉi tiun listgrupon anstataŭ la malnovan (elna-membroj@yahoogroups.com).

Se vi volas legi la mesaĝojn de ĉi tiuj listgrupoj, kaj vi ne jam estas membro de Esperanto-USA, bv. membriĝi ĉe **esperanto-usa.org**. Nia kotizo restas malalta. Ankaŭ estroj de asocioj en aliaj landoj rajtas membriĝi en la listgrupoj.

Ekzistas aliaj grupoj, sed ĉi tiuj estas la **oficialaj** listgrupoj de Esperanto-USA. Ni publikigos la nomojn de la estroj kaj la politikon de la grupoj de tempo al tempo en la listgrupoj mem kaj ĉi tie en nia presita organo.

Ni anoncos la novajn listojn per mesaĝoj al la malnovaj listgrupoj ĝis la fino de 2008, kaj ne plu uzos tiujn grupojn post la fino de la jaro.

Politiko pri la uzado de la diskutgrupoj:

La mesaĝoj temu pri la celo aŭ sekvu la celon de la koncerna diskutgrupo. Oni ne rajtas uzi la listgrupojn por reklami aŭ vendi komercajn varojn aŭ enmeti nedecajn artikolojn aŭ bildojn. Esperanto-USA estas neŭtrala rilate al religio, politiko, kaj socio-ekonomia teorio. Pro tio, tiaj mesaĝoj ne rajtas aperi. Tamen, oni rajtas anonci politikajn aŭ religiajn aferojn, se temas pri horaro aŭ plano pri Esperanta evento. Ekzemple, oni rajtas anonci la horaron de landa kongreso, kiu enhavas diservon aŭ viziton al sinagogo. Tiu anonco rajtas havi kelkajn mallongajn detalojn por informi la leganton pri kiu religio ĝi rilatas. Esperanto-USA estas neŭtrala 501(c)(3) neprofitcela organizaĵo, kaj ĝi sekvas la regulojn kaj leĝojn de la registaro kaj la statuton de la organizaĵo mem. Oni ne rajtas uzi la membroliston de la diskutgrupo por aliaj celoj ekster la grupo. La nomoj kaj retadresoj estas privata informo, nur por la diskutgrupo kaj ne por uzi alimaniere.

Amike kaj kunlabore,

—Filipo (Phil DORCAS, prezidanto, Esperanto-USA)

Renkontu min en Sankta-Luiso

La 2009-jarkongreso de Esperanto-USA okazos en Sankta-Luiso, Misurio la 22-an ĝis la 25-an de Majo (la tritagan semajnfinojn rilate al la Memoriga Tago). La temo estos **"Kiel varbi novan generacion."** Se vi volas prelegi aŭ prezenti ion, kontaktu Ron GLOSSOP (vidu sube).

Speciala gasto de la kongreso estos Julián Hernández ANGULO el Kubo. Julian, kiu ludas gitaron, komponas kaj kantas belajn Esperantajn kantojn. Li ankaŭ prelegos pri la instruado de Esperanto kaj la Esperanta movado en Kubo.

Nia landa jarkongreso kunvenos en la "Sheraton Westport Lakeside Chalet Hotel," la sama bela hotelo kie nia organizo kongresis en 1999.

Vi baldaŭ ricevos pli da informo. La grava afero nun estas rimarki ke la kongreso okazos en Majo anstataŭ Julio.

Meet me in St. Louis

The 2009 annual convention of Esperanto-USA will occur in St. Louis, Missouri the 22nd to the 25th of May (the three-day weekend related to Memorial Day). The theme will be "How to enlist a new generation." If you would like to give a talk or presentation, contact Ron GLOSSOP (contact info below).

A special guest of the congress will be Julián Hernández Angulo of Cuba. Julian, who plays the guitar, composes and sings beautiful songs in Esperanto. He also will talk about the teaching of Esperanto and the Esperanto movement in Cuba.

Our national annual convention will meet in the "Sheraton Westport Lakeside Chalet Hotel," the same beautiful location where our national organization convened in 1999.

You will soon receive more information. The important thing now is to note that the convention will occur in May rather than July.

Kontaktu: rglossop@mindpring.com (aŭ) 8894 Berkay Avenue, Jennings MO 63136-5004.

Geedziĝis DORCAS/MAGALLÓN

Filipo DORCAS el Fort Worth, Teksaso, Usono, kaj Elizabeto MAGALLÓN el Tahlequah, Oklahomo, Usono, geedziĝis la 14-an de Junio, 2008 en Tahlequah, Oklahomo, Usono.

La ceremonio fariĝis trilingve: Esperante, hispane kaj angle.

La temo de la ceremonio estis: **"Farante Pacon kun la Pasinteco, La Espero por la Venonteco, kaj Vivi en la Amo de Dio"**.

La geedziĝan ceremonion kondukis Pastoro George McLAUGHLIN de Tahlequah, Oklahomo, Pastoro Stephen ALLISON el Viskonsino, Pastoro Kevin BULT, nuntempe el Mesquite, Teksaso, kaj Lee MILLER el Sankta Luiso, Misurio, ĉiuj el Usono. Kevin BULT tradukis hispane, kaj Lee MILLER tradukis Esperante.

Kaj la recepto kaj la tagmanĝo estis provizataj el Tahlequah, sed ankaŭ inkluzivis kuiristojn invititajn el aliaj urboj. La kuko estis ses tavolo kuko kun butera dolĉaĵo. La ornamadoj ĉe la supra tavolo de la kuko estis verda, kvin-pinta stelo kaj globo de la tero, ambaŭ faritaj el dolĉaĵo. [vidu la kovrilon — Red.]

La geedziĝo kaj kuko atingis internacian atenton per anonco kaj priskribo de la Pola Radio.

Filipo DORCAS estas la prezidanto de Esperanto-USA. Elizabeto antaŭe instruis en publikaj lernejoj de Tahlequah, Oklahomo, kie ŝi instruis kursojn pri Esperanto, Esplorante Lingvojn, kaj La Hispana Lingvo.

La geedziĝa paro nun loĝas en Fort Worth, Teksaso, Usono.



NASK: ju pli juna, des pli mojosa

Kio plej diferencas Nord-Amerika Somera Kursaro 2008 de la mejlŝtona de 2007?

Kial ĉi tiu lernejo amata en la kadro de la lingvistika fako de Universitato de Kalifornio ĉe Sandiego pli mojosas (klarigos mi baldaŭ tiun ĉi vorton!)?

Nova koncepto efektiviĝis! Triono da ni NASK-anoj estis junuloj! La ceteraj, certe mi, klare lernis, eĉ zorge uzis, la vorton mojosa. Jen: moderna, junstil/a; mi literumu: mo, jo, s.../a.

Tiu ĉi vorto tute nova ne estas. Sed ĉe NASK 2008 aŭdis ĝin la

unuan fojon la nuna skribanto ekster la klasĉambro.

Allogi plentempajn studentojn, instruistojn ĉi jare la celo estis. Ĉi tiu celo estis ja brile trafita. Inter la postkomencantoj troviĝis iu inspira, aktiva profesoro, afable, pacience eminenta.

Do kia estis NASK 2008?

Ju pli da juneco, des pli da ridado.

Tion ĉi mi relernis, inspirita de amataj de mi amikoj.

—Keneĉjo GOLDBERGO



Keneĉjo kun aliaj mojosuloj ĉe NASK. De maldekstre: Amri WANDEL, Bertilo WENNERGREN, Mar CARDENAS, Steĉjo CYBULSKI, Dori VALLON-WHEELER, Simono KEITH, Keneĉjo GOLDBERGO, Helen FARAJI.

Kunlaboro esperantista... inter Ĉikago kaj Beogrado

Beograda Esperanto-societo "Radomir Klaji" en Serbujo kaj Esperanto-societo de Ĉikago en Usono establadis ligojn. Ideo devenis de s-ro Viktor PAJUK, prezidanto de Ĉikaga Esperanto-Societo.

Ĉikago kaj Beogrado ĝemeliĝis la 7-an de Junio 2006. Ĉarton subskribis la tiamaj urbestroj de kaj Ĉikago kaj Beogrado, respektive Richard DALEY kaj Nenad BOGDANOVI. Beogrado fariĝis la 25-a ĝemelo de Ĉikago, inter Milano, Parizo, Ateno, Moskvo kaj aliaj.

Esperantistoj de la du urboj planas interŝanĝi informojn por siaj bultenoj, organizi interkonajn kaj personajn kontaktojn en kongresoj, interŝanĝi librojn kaj esperantaĵojn kaj partopreni en interurba kunlaboro.

Unuaj paŝoj estas faritaj. Espereble, kunlaboro helpos al ambaŭ societoj plibonigi kaj lernadon de la internacia lingvo kaj amikajn kontaktojn de esperantistoj el tiuj geografie malproksimaj sed anime proksimaj urboj.

—Dimitrije JANICIC (pere de UEA)

Novjorkanoj ekspozicias ĉe urbocentra librofoiro

Novjorkaj esperantistoj havis plur-jaran tradicion ekspozicii ĉe la centra librofoiro "Novjorko Estas Libro" okaze en la urbocentro. Dum kelkaj jaroj tiu organizo ĉesis funkcii. Nijl BLONSTEIN decidis renovigi la tradicion en

apuda grafo/distrikto Brooklyn. La Librofestivalo de Brooklyn (brooklynbookfestival.org) havis plurajn centojn da eldonistoj kaj kelkajn senprofitcelajn grupojn tie. Vizitis proksimume 10 000 homoj la "librotendojn". Notindas ke somero "revenis" kun plena varmeco: 87 gradoj farenhejtaj. Arboj de la parko donis iom da ombro.

Alvenis la tago, dimanĉo 14-a de Septembro. Nijl BLONSTEIN kaj Melinda SCHROEDER disdonis 50 informilojn al la demandantoj dum 6 horoj. Shep WAHON, konata en la loka movado, trovis nin hazarde. Granda afiŝo angla-lingva, profesie produktita, "Esperanto for International Friendship", estis videbla al centoj da preterpasantoj. La informilo inkluzivis la ret-adreson esperanto-usa.org kaj aliajn. Ĝenerale la homoj kiuj parolis kun ni iam aŭdis pri Esperanto sed kredis ke la movado malaperis.

La etoso estis agraba kun deko da muziko-koncertoj kaj prelegoj de la aŭtoroj de montrataj libroj. Oni uzis apudan registaran domon por unu el la prelegejoj.

—Nijl BLONSTEIN



Volas korespondi

Gina KUBIAK, Ul. Podjazdowa 6, 60-480 Poznań, POLAND <olenka84@interia.eu>

Mi estas pola esperantistino, 54-jaraĝa. Mi loĝas en Poznano en mia domo, proksime apud lago Kierskie.

Mi deziras korespondi esperante, france, ruse kun afabla sinjoro de via belega lando. Mi estas eksedziniĝinta de kvar jaroj. Mi esperas ekkoni la viron, kiu estas nur libera, tute soleca, (nur pli maljuna), simpla, normala, sincera, kiu deziras amikiĝi.



Making things harder than they really are

At some point after we start learning Esperanto, we begin to notice things that make the language seem harder than it needs to be. For example:

Ni komencis la kunvenon, kaj la kunveno komenciĝis.

Mi boligis la akvon, kaj la akvo bolis.

Why say *komenci* in one place and *komenciĝi* in the other? And why does *boli* work differently?

The usual explanation is that *komenci* is transitive and *boli* is intransitive, and to use *komenci* intransitively or *boli* transitively requires a suffix. Even if students remember what “transitive” and “intransitive” mean, they’re left with the impression that the transitivity of Esperanto verbs is something like the gender of French nouns: a more or less arbitrary attribute that unfortunately has to be looked up in a dictionary and committed to memory.

And Esperanto is supposed to be easy?

Even worse, some verbs in the original *Plena Vortaro* were labeled neither “*tr*” (*transitiva*) nor “*ntr*” (*netransitiva*) but “*x*”, meaning that they are sometimes transitive and sometimes not! *Fumi*, for example, can be used both ways:

La fajro fumis dum li fumis sian cigaredon.

The fire gave off smoke while he smoked his cigarette.

And here’s another surprise: Suppose you want to call a meeting to order by saying “Let’s begin.” The sentence contains no object, so should you say “*Ni komenciĝu*”? No, the student is told, you say “*Ni komencu*”, because you’re using a transitive verb “absolutely”.

Students can be forgiven for finding this confusing, or even a bit nuts. It’s a case of an explanation making something sound much harder than it really is. Let me suggest an alternative.

Suppose you’re trying to explain to your students the difference between *boli* and *boligi*. What does water do when it boils? You might liven up the class by asking them to act it out, or you could act it out yourself at the risk of some passerby in the hall calling the paramedics.

Okay, now what do *you* do when you boil water? Not at all the same thing that the water itself does! It’s a different action, and Esperanto recognizes that difference by using a different verb—but one you can easily and logically create from the first verb.

When you boil water what you’re really doing is *making the water boil*, and in Esperanto this meaning of “make” is frequently conveyed by the suffix *-ig*. To put it differently, *-ig* conveys the idea of causation. That is, “to

make (something) boil” or “to cause (something) to boil” is “*boligi (ion)*”.

The situation is different with *komenci*, where the meaning is inherently transitive, “to begin (something)”. But there’s still a clear distinction between what *you* do when you begin a meeting and what the *meeting* does when it begins. So as before, the two meanings are conveyed by two different (but very similar verbs). This time, though, we need a suffix that conveys the idea of being acted upon or becoming, corresponding to “to get” or “to become” or “to be” in English. That suffix is of course *-iĝ*.

The similarity between *-ig* and *-iĝ* is a blessing and a curse. If you know one you can easily remember the other, but it’s easy to get the two confused. My best suggestion is to remember a specific example of each, but if you know of a better aid to memory, let me know.

The meaning of *komenci* isn’t inherently obvious, but if you know the phrase *la konveno komenciĝis*, you know that *kunveni* must mean to start something. This suggests that it might help to introduce *komenciĝi* before *komenci* and likewise with other verbs whose meanings may not be obvious.

A student is much less likely to be confused by a verb like *manĝi*:

Mi manĝis la panon, kaj la pano manĝiĝis.

I ate the bread and the bread was eaten.

This example illustrates very memorably that English is not, after all, simpler than Esperanto here. Yes, in English we can say, “We began the meeting and the meeting began” without worrying about the difference, but we can’t say “We ate the bread and the bread ate”. Esperanto is more consistent (and logical):

Mi manĝis la panon, kaj la pano manĝiĝis.

Ni komencis la kunvenon, kaj la kunveno komenciĝis.

In practice the distinction might still make Esperanto less than maximally easy (as Bernard Golden argued in *Marĝene de la Lernolibro*), but here, as in a few other areas, Esperanto sacrifices maximum easiness for expressive precision.

In any case, thinking of things this way lets a student see why we say “*Ni komencu!*” instead of “*Ni komenciĝu.*” It’s for the same reason that we say “*Ni manĝu!*” (“Let’s eat!”) rather than “*Ni manĝiĝu!*” (“Let’s get eaten!”). When we begin something (a meeting, a job, or whatever), we ourselves are not what’s being begun.

To sum up: Transitivity isn’t some arbitrary trait that you have to memorize; it is inherent in the meaning of the verb—or in each



D. Gary GRADY

Gary is Vice President of the American Association of Teachers of Esperanto (AATE). He lives in Durham, NC.

dgary@mindspring.com

meaning, when the verb has more than one. This explains the business with *fumi*: The meaning “to give off smoke” is inherently intransitive, whereas “to smoke (something)” implies an object. (The *Plena Ilustrita Vortaro* and *NPIV* recognize this distinction by labeling as “*tr*” or “*ntr*” not the verb itself, but the definition, thus eliminating the confusing “*x*” of the older *PV*.)

So you can reassure your students that when they learn verbs in Esperanto they don’t have to worry about memorizing transitivity. They simply have to learn the specific meaning of the verb, which is something they’d expect to learn anyway.

Finally, you can cover all this without ever mentioning the word “transitivity”—especially when you first bring up the subject. At some point, however, it’s useful to explain the meaning of the abbreviations “*tr*” and “*ntr*” since they show up in most Esperanto dictionaries. Rather than thinking of them as separate from the definition, it’s useful to view them as part of it: an extra bit of clarification. This is especially true in Esperanto-English dictionaries, where the meaning may be ambiguous in English.

A personal note

I was planning to devote this or the next column to an interview with Don Houpe, asking him about his experience teaching Esperanto to high school students for more than two decades. But August 20 I received an email from one of his daughters telling me that Don had just died. His death came as a shock to everyone who knew him and his loss was a heavy blow to the local Esperanto community in the Raleigh-Durham-Chapel Hill area. Many times he arranged to host regional meetings held at his school, as recently as last spring. He was also well-known among the students and teachers at NASK, not only taking part himself but sending several of his students. Don was besides one of the major customers of the Esperanto-USA book service, giving his school library one of the largest collections of Esperanto materials in the United States. He will be greatly missed by all who knew him, at NASK, in AATE, in Esperanto-USA, in our local and regional groups, and across Esperantujo generally, and as students, colleagues, family, and friends. I don’t think I’ve ever seen a funeral service with as many mourners. ★

Somere 2008

La kunveno de E-USA okazis en bela Montrealo—samtempe kun la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE). Aliĝis 193 esperantistoj; 78 estis kanadanoj! Mirige granda proporcio de kanadanoj—pli ol mi iam ajn vidis antaŭe. Partoprenis nur 74 usonanoj, kaj multe el tiuj estis malofte vidataj en antaŭaj ELNA-kongresoj. La kutimaj nombroj de usonaj partoprenantoj estas nur iomete pli grandaj—sed 74 estas kontentiga kvanto kiam ili devas uzi pasportojn por partopreni nian usonan kongreson.

La kanadanoj povas fieri pri la fakto ke ili sukcesis fakte gastigi la unuan TAKE en la norda parto de nia kontinento. Ĝi estis sufiĉe multekosta pro la fakto ke ni, kiu povas pli facile pagi, pagis por subteni tiujn el la pli sudaj landoj, kaj lokanoj gastigis ilin amase en hejmoj. Tamen, ne sufiĉe da personoj el la centraj kaj sudaj amerikaj landoj povis partopreni pro la granda kosto de la vojaĝo kaj pro vizaj problemoj. Estus eĉ malpli facile gastigi TAKE en Usono. La membroj esprimis la deziron ke ni ne baldaŭ “nacie” kongresu eksterlande. La venonta TAKE okazos post 3 jaroj en Brazilo—ĉarma, vizitinda lando!

La 93-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en la ĉefurbo de Esperantujo, kie situas la oficejo de UEA, en Roterdamo, Nederlando—21-an–26-an de Julio. Tre bona kaj detala raporto pri la kongreso aperis en la septembra numero de *Esperanto*. Spite al aĉa pluveca vetero, ĝi sukcesis. La salutoj el 73 landoj estis iom pli longaj sed pli ĉarmaj ol kutime, uzante

frazetojn en naciaj lingvoj por pruvi la temon de la kongreso—“Lingvoj, trezoro de la homaro.” Steve WAGENSELLER salutis la kongreson en la nomo de Usono kun la frazo —“A-lo-Ha!” Unu el la kongres-ĉambroj estis dediĉita al nia kara DonHARLOW.

En la festparolado, Humphrey TONKIN parolis pri la centjariĝo de UEA (kaj la oficejo en Roterdamo), priskribis kiel ni kreskis dum periodoj de grandega ŝanĝo, kaj daŭre vivas en periodoj de rapida ŝanĝo, sed ĉefe li emfazis la taskon kiun ni nun frontas. Li emfazis ke, “Nia ĉefa servo al la membroj... estas la progresigo de Esperanto... ĉefe ni dediĉu nian forton al la disvastiĝo de la lingvo, ĉar ju pli da homoj ĝin parolas, des pli valora ĝi fariĝas; ju pli da homoj posedas ĝin, des pli utila ĝi fariĝas al ĉiu posedanto.” Ni devas profiti de uzo de ĉiu rimedo havigi Esperanton al la mondo. Se vi ne membras en UEA, nepre petu kopion de la prelego de d-ro TONKIN.

La nuna estraro (elektita en 2007) sub la gvido de Probal DASGUPTA bele kunlaboris kaj la komitato diskutis la multajn defiojn kiuj frontas la Esperanto-movadon. Ili devis pli alltigi la membrototizojn de UEA je unu eŭro. (Nia komitatano voĉdonis kontraŭ tiu plialtiĝo, kaj la aliaj komitatanoj ridetis pro kompreno de la grandega falo en la valoro de la usona dolaro. Kiel alia honoro, ili elektis Lusi HARMON esti unu el tri komisiitoj de la Elekta Komisiono por la kandidatoj por la estraro por 2010. Se vi havas ideojn pri kiuj vi dezirus vidi kiel venontaj estraranoj de UEA, kontaktu komitatanon A por Usono (LusiHarmon@aol.com).



Lusi HARMON

Lusi estas estrarano de E-USA kaj produktinto de la fama *Pasporto*-kurso. Inter siaj vojaĝoj tra Esperantujo, ŝi loĝas en Oakland, Kalifornio.

LusiHarmon@aol.com

Antaŭ, dum, kaj post la UK, multaj ekskursoj okazis: Ofta vizitanto al Usono, Hans ADRIAANSE invitis, kaj Esperanto Vojaĝ-Servo organizis “Landan Krozon” 26 Julio–2 Aŭgusto en Maastricht, Nederlando kaj ĉirkaŭaĵo. Ekster la ŝipo en Liege, Belgujo—la grupo fotiĝis. Partoprenis kvin japanoj, kvar brazilanoj, du portugaloj, du israelanoj, du francoj, du germanoj, du nederlandanoj, unu meksikanino, kaj unu kubano. Ĉi-foje estis nur kvin usonanoj kiuj partoprenis kun tiu feliĉa grupo. En la fono, vi povas rekoni triope, Anna kaj Larry BENNETT, kun Miko SLOPER. Maldekstre Arnold VICTOR; kaj en la kaŭranta vico, Lusi HARMON. Ankaŭ en la unua vico estas la bela nova edzino de Miko, Hansa KRIJGSMAN kaj je la plej dekstra flanko, la invitanto: Hans ADRIAANSE.

Pensu pri bonegaj aranĝoj por 2009!

Venontaj eventoj por 2009:

Kongreso de Esperanto-USA
St. Louis, MO—22–25 Majo

Nord-Amerika Somera Kursaro
San Diego, CA—Julio

La plej bona en la mondo! Tri semajnoj—dato ankoraŭ ne anoncita, tamen en Julio kaj ne konkurencos en 2009 kun nia landa kongreso.

94-a Universala Kongreso
Bjalistoko—25 Julio–1 Aŭgusto

En la naskiĝurbo de kreinto Ludoviko L. ZAMENHOF. Tre specialaj aranĝoj por celebri lian naskiĝon antaŭ 150 jaroj. Antaŭ kaj post-kongresaj ekskursoj aranĝos:

Esperanto Vojaĝ-Servo

1824 Euclid Avenue
Berkeley CA 94709
Tel.: 510-531-8393

<LusiHarmon@AOL.com>



Koro vidas pli bone ol okuloj

Unu el la plej bonaj ekzercoj por alkutimiĝi al la parolado de Esperanto (aŭ de iu ajn lingvo) estas daŭre priskribi tion, kion oni vidas. La plej bona maniero plenumi tian ekzercon estas gvidi iun kiu tute ne vidas. Tian ekzercon mi povis multe ĝui en la dek-kvina somera Rekapabla Kursaro de Esperanto (kaj angla) por blinduloj, okazinta en 2008 de Aŭgusto 16 ĝis 23 en Pensiono Ŝance, kiu situas montpiede inter arbaro kaj kampoj rande de Nová Ves en Frýdlant nad Ostravicí, oriente de Olomouc en la Ĉeĥa Respubliko.

Vidantoj, nevidantoj kaj malfortvidantoj kune vivis, lernis, ekskursis, kantis, ludis, manĝis, promenis, kaj interamikiĝis en amika esperantista etoso. Tio donis al mi multajn okazajn interaĝoj kun nevidantoj en diversaj situacioj. Simpla paŝado tra la pensiono, de la manĝejo al dormĉambro, iĝas interesa defio kiam mi paŝas kun blindulo tenanta mian brakon. Mi devas atenti ne nur min mem, sed ankaŭ la duan personon. Ŝtupojn la blindulo povas mem senti anticipante kiam mi surtretas ilin, ĉar mia brako leviĝas aŭ malleviĝas kun mi. Sed mi devas atenti la larĝon de pordoj kaj aliajn obstaklojn en la vojo. La iro kun blindulo kontraste al sola iro similas al la kontrasto inter ŝoforado de kamiono kompare kun aŭteto. Oni bezonas pli larĝan vojon. Necesas iri malpli rapide kaj lasi pli da spaco inter mi kaj vojflankaj obstakloj. Por eviti kolizion, mi devas neniam forgesi ke mi ne estas nur la aŭteto, ke mi estas nun kamiono kiu okupas pli da spaco ol kutime.

Dum ekskursoj pejzaĝon mi klopodis priskribi en la buso, kaj la vidaĵojn post la elbusiĝo. Kun tutblindulo ĉe la brako mi grimpis la 392 ŝtupojn de la centra placo al la supro de la fama turo en Štramberk.

Malebenaj antikvaj ŝtonaj ŝtupoj komence, poste tre kruta kaj mallarĝa ŝtala spirala ŝtuparo, kaj laste neregula serio de mallarĝaj nerektaj lignaj ŝtuparoj kondukis nin al la supro kun nesuperebla elrigardo al vasta pejzaĝo en ĉiu direkto. Belega! Sed, diable, kiel ĝin adekvate priskribi? Ne eblas! Tamen, la klopodoj donas bonan defion kaj eventualan inspiron al belliteraturo.

Ekskurso al subĉiela muzeo en Rožnov donis aliajn defiojn por komuniki la vidaĵojn al blinduloj. Kun granda ĝuo mi priskribis la ekipaĵojn kiuj per povo de akvo falanta sur lignajn akvoradojn faras diversajn laborojn, ekzemple en forĝejo blovi fajron, funkciigi martelegojn kaj turni ŝlifŝtonegon, batadi lanan ŝtofon por densigi ĝin, segi ŝtupojn por fari tabulojn, kaj mueli grenon. Ĉar ĉiaj iloj min interesas, mi plezure rigardis tiajn aparatojn kaj apudajn ilojn, kaj mi ĝojis komuniki al kunuloj kiaj estas la iloj kaj kiel ili funkcias. Trans la ŝoseo en alia parto de la subĉiela muzeo ni vagis inter malnovaj lignaj konstruaĵoj. Ili ĉiu havas sian propran historion, sed laŭ aspekto multaj similas unu al alia. Feliĉe, multaj el la inform-tabuloj tie estas trilingvaj, do mi povis legi informojn angle kaj elbuŝigi ilin en Esperanto por la grupeto da nevidantoj kiujn akompanis mi.



Joel BROZOVSKY

Esperanto estis lia ĉefa lingvo dum du jardekoj eksterlande kaj dum kvin jaroj, kiam li estris la Centran Oficejon. Li nun loĝas en sia naskiĝurbo, Spokane.

betulo@mac.com

En aliaj lokoj, stratsignoj kaj inform-tabuloj kutime estas nur en la ĉeĥa lingvo. Tio prezentis plian malfacilaĵon por mi. Se estas en mia grupeto ankaŭ ĉeĥo, mi povas (malrapide kaj pene) voĉlegi la ĉeĥan skribaĵon, kaj la ĉeĥo tradukas ĝin al Esperanto. Tio postulas multe pli da tempo ol se mi povus mem kompreni la skribon kaj tuj diri en Esperanto, sed por stratsignoj kaj vojindikiloj tio funkcias sufiĉe bone.

Antaŭtagmeze partoprenantoj diligente lernis Esperanton aŭ anglan lingvon. Kelkaj eklernis sistemon de brajla stenografio por Esperanto instruata de Harald RADER el Aŭstrujo. Li kiel spertulo ankaŭ en la germana brajla stenografio sukcesis krei por si karieron kiel oficiala protokolisto ĉe karintia parlamento.

Ĉar la lingvaj kursoj havis po du nivelojn, kaj la plej granda klaso, tiu por progresintaj Esperanto-lernantoj, havis du gvidantojn, entute estis ses respondecaj instruistoj. Mi partoprenis en la Esperanto-kurso por progresintaj gvidata de ges-roj Milena kaj Jirka JELINEK. Ili bonege utiligis la kapablojn kaj spertojn de la grupanoj por riĉigi la lernadon. Jan WERNER estris lingvan angulon en kiu li preparolis lingvajn erarojn oftajn ĉe ĉeĥoj. Inter ili mi rekonis multajn erarojn oftajn ankaŭ ĉe alinacianoj. Ĉiu el la sep alilandanoj en la klaso havis okazon paroli pri siaj spertoj. La ses blindaj alilandanoj parolis interalie pri siaj karieroj kaj pli ĝenerale pri ebloj de eduko kaj laboro por blinduloj en siaj lokoj kaj kampoj. La sola plenvidanta alilandano en la klaso (mi) parolis pri la japana religia kaj kultura organizo Oomoto kaj pri siaj travivaĵoj laborante ĉe Oomoto dum pli ol dek du jaroj.

Gravan parton de la programo okupis muziko. Partoprenis pluraj talentaj muzikistoj kaj muzikinstruistoj kiuj bonvolis prezenti sian arton en vesperaj kunvenoj. En la kurso por progresintoj, Milena pacience instruis du kantojn kun po kvar versoj al la klaso. Ĉar multaj el la partoprenantoj ne povas vidi skribaĵon, ili devis simple parkeri la kantojn. Tial la instruado postulis paciencon kaj multajn ripetojn. Tiel eĉ mi povis lerni la kantojn. Kutime kiam oni instruas kanton al grupo, oni celas homojn kiuj povas rapide lerni kantojn kaj kiuj povas legi la tekston


(daŭrigo sur p. 9)



Gesinjoroj Milena (dekstre) kaj Jirka JELINKOVÁ. Joel fotis ilin pli frue en la somero en Kroatujo okaze de la internacia blindula kongreso de Esperanto.

Forpasoj

Donald W. HOUPE



Donald W. HOUPE, PhD, longtempa kaj aktiva esperantisto, lingvisto, kaj lingvoinstruisto, mortis la 20-an de Aŭgusto en Chapel

Hill, Norda Karolino, Usono. Li havis 67 jarojn. Don estris la departamenton de fremdaj lingvoj de la Nord-karolina Lernejo pri Scienco kaj Matematiko, gimnazio en Durham, kie li instruis ekde ĝia fondo en 1980. Postvivas liaj edzino, du filinoj, kaj aliaj familianoj.

Don esperantistiĝis antaŭ jardekoj kaj instruis Esperanton al centoj da studentoj, kelkaj el kiuj ankoraŭ aktivas. Krom Esperanto li instruis la hispanan, la francan, kaj la rusan, kaj fojfoje aliajn lingvojn—kaj li daŭre lernis novajn. Pro lia ŝercemo kaj ĝentila maniero li estis tre amata de liaj studentoj kaj kolegoj. Dank' al li, la gimnazia biblioteko havas unu el la plej grandaj kolektoj en sudorienta Usono de libroj, kompaktdiskoj, videofilmoj kaj aliaj aferoj en kaj pri Esperanto.

Li partoprenis en la loka, regiona, landa, kaj internacia e-movadoj,

membris en Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto, organizis regionajn kongresojn, kaj kelkfoje ĉeestis la Nord-Amerikan Someran Kursaron. Lia mallonga komika videofilmo "D-ro Ratamanto" gajnis premion en internacia konkurso pri Esperanto-filmoj kaj nun spekteblas diversloke en la reto.

Post lia morto, kelkaj amikoj komentis, ke ili ne povas memori okazon, kiam li esprimis koleron. Dum la funebra ceremonio, en preĝejo plena je familianoj, kolegoj, kaj amikoj, unu parolanto diris, "Don Houpe estis homo de malmultaj vortoj, sed multaj lingvoj."

—D. Gary GRADY

William Keith BLEDSOE



Forpasis William Keith BLEDSOE, 94-jaraĝa, la 3-an de Aŭgusto en Sedro-Woolley, Vaŝingtonio. Keith naskiĝis en 1914, diplomigis kiel

inĝeniero pri elektro, kaj servis en la mar-armeo dum ok jaroj. Lin dungis Boeing kiel inĝenieron. Li edziĝis en 1947, kaj lia edzino Jackie mortis en 1992.

Keith bone parolis multajn lingvojn, kaj li esperantistiĝis ĉ. 1932. Li estis membro de la Seatla Esperanto-Societo, ELNA, UEA, kaj li

estis fonda membro de la estinta SEVLO (Societo Esperantista de la Verda Lago). Ĉiuj memoras lin afabla, bonkora, kaj inteligenta. Kun longa blanka barbo, Keith aspektis kiel Sankta Nikolao. Li organizis la unuajn regionajn konferencojn de NOREK en la 80-aj jaroj. Keith havis bonegan traduk-kapablon—multaj memoras lian brilan tradukon de la angla diraĵo "The hurrier I go, the behinder I get" kiel "Pli haste mi juas, pli tarde me desas."

—Arlyn KERR

Darlene F. EVANS



La 18-an de Septembro forpasis dumviva membro Darlene Fust EVANS en Indianola, Iovao. Ŝi havis 68 jarojn.

Darlene diplomigis de la Universitato Purdue en 1962. Ŝi laboris nokte ĉe maljunulejo kaj estis aktuaria lernanto ĉe la asekura firmao CNA Insurance en Ĉikago. Ŝi estis membro de la Bahaa Esperanto-Ligo, gvidanto kaj matrikulisto por Camp Fire, organizaĵo por geknaboj, kaj ŝi kantis en la Ĥoro Sweet Adelines. Por honoro ŝian memoron, bonvolu donaci al Habitat for Humanity en Indianola.

—The Des Moines Register

Koro (daŭrigo de p. 8)

skribitan, kaj tial mi mem, nesperta pri kantado, ne sukcesas ellerni ĝin. Mi dankas, ke ĉi-foje mi ja povis.

Kiam, antaŭ la komenco, oni diris al mi ke ankaŭ anglan lingvon oni instruos en la kursaro, mi iomete timis, ĉar miaj spertoj per angla lingvo kaj lernantoj de angla lingvo ĝenerale diferencas ol tiuj per Esperanto, kaj mi certe preferas la esperantajn. Tamen, mi ĝoje kaj mire konstatis ke la ĉeesto de angla instruo ne difektis la esperantan etoson. La instruistoj de angla lingvo, brito Michael COUNIHAN kaj lia ĉeĥa edzino Miloslava tre simpatias kaj bone interplektiĝis kun la esperantistoj.

La anoncoj kaj tutgrupa programo okazis en lingvoj ĉeĥa kaj esperanta, sed neniu plendis pri manko de angla, nek insultis Esperanton favore al angla. Michael eĉ petis min traduki anglan kanton al Esperanto, ĉar li volis por vespera programo kanti ĝin en Esperanto.

Amikiĝo kaj amikeco estas plej gravaj elementoj de ĉiu Esperanto-renkontiĝo kaj tiu ĉi ne estas escepto. Funkcio de la koro multe pli gravas ol funkcio de okuloj. Mi tre dankas tiun ĉi okazon konatiĝi kun multaj bonkoraj novaj amikoj.

Post la kursaro mi veturis kun Milena kaj Jirka JELINEK al ilia hejmo kaj gastis ĉe ili semajnfine. Mi ne devis pagi por la trajnbileto, ĉar kiel akompananto de

blindulo mi rajtas veturi senpage. La blindulo pagas rabate. Ili loĝas en bela urbeto Jilemnice en montaro Krkonoŝe proksima al la limo kun Pollando. Ili ambaŭ estas muzikinstruistoj kaj havas mirigan kolekton de instrumentoj. Speciale belegaj estas la familio de liutoj.

Dum mia lasta tago en Ĉeĥujo, Jirka kaj Milena gvidis min tra la malnova urbocentro de Prago. Neniam en mia vivo mi havis pli bonan ĉiĉeronon ol Jirka! Kvankam blinda, li tre detale memoras la urbon de kiam li studis tie (kaj ankoraŭ povis vidi). Lia scio pri historio, kulturo, kaj arkitektaj stiloj estas profunda kaj ni ĉiuj ĝuis liajn multajn informojn. Kia privilegio esti gvidata de blindulo! ★

Ĉe la redaktista skribotablo

Pri la unua traduk-provo, ni ricevis kelkajn komentojn kaj reagojn. Sherry WELLS skribis:

“La teksto NE temas pri *amindumi*. Nur sekso. Ne eĉ *seksumi*. DEFOE, lerte, uzis eŭfemismon. ‘Busy with her in another way.’ Estas pli amuze tiel. ‘Sets the scene.’ Kaj pli ĝuste. Li—la viro—simple uzis ŝian korpon simile al masturbado—ŝi ne estas persono, simple ‘aĵo’. Do *amindumi*, *seksumi*—ne, ne, ne!”

Interesus nin scii kiel Sherry tradukus la frazon....

Humphrey TONKIN detale respondis pri diversaj punktoj en la “modela” traduko. Liaj komentoj estas sufiĉe trafaj kaj pensinstigaj ke ni prezentos plurajn el ili al vi:

“Via artikolo en la plej nova Esperanto-USA levas plurajn interesajn demandojn. Laŭ mi, tamen, vi ne donas sufiĉan atenton al la stila demando, interalie la fakto, ke tiu teksto ekzistas jam preskaŭ tricent jarojn—kio siavice necesigas la kreon de stilo sufiĉe distanca de la kutima por doni certan guston de nekutimeco.

Rilate viajn specifajn komentojn, jen kelkaj reagoj...

Dexterous. Mi kredas, ke via pluraligo de “a fellow” estas mislego. Ne temas ĉi tie pri la ĝenerala klaso de bonuloj sed pri specifa bonulo. Oni povas doni iom pli da aganteco al la radiko ‘lert-’ per uzo de verba formo, kvankam mi konsentas, ke vortoj kiel ‘dexterous’ aŭ ‘clever’ ne tre bone tradukiĝas per tiu radiko.

Was busy with her. Se Defoe volus skribi “amindumi” li skribus “amindumi.” Ne: tiu ĉi estas seksa renkontiĝo traktata kiel negoco, kaj sekve la eŭfemismo estas esenca elemento en la stilo.

Conveyed. Plia afereca vorto (memoriga pri “conveyances” k.s.). “Liveri” bone funkcias. Mi elektis “transportis”, denove ĉar tiu esprimo donas tute senemocian nuancon. Problemo pri “elpoŝigis” estas tio, ke poste oni devas aludi al “horloĝpoŝo” (vi pravas pri brakholoĝoj, kiuj estas inventaĵo de la 19-a jarcento, populara nur ekde la 20-a), do dufoje ‘poŝ-’.

Gilded counters. Nu, la verbo “to gild” estas tamen “orumi” (au eventuale “oraĵumi”). Tiuj ĵetonoj (au disketoj, laŭ mia uzo, kvankam ĵetono estas pli preciza kaj pro tio preferinda) povus esti tiuj uzataj por vetludi, ekzemple—en kiu kazo nia damo



Lee MILLER



Tim WESTOVER

En ĉi tiu rubriko Lee kaj Tim prezentas tradukdefiojn por vi. Bonvolu sendi ne plurajn diversajn provojn, sed **nur unu** tradukon al la jenaj adresoj samtempe:

timwestover@yahoo.com
lamiller@centurytel.net

Leginte viajn tradukojn, ili faros resumon de la plej bonaj provoj kaj sukcesoj, kune kun komentoj kaj reagoj pri kelkaj malpli sukcesaj rezultoj.

verŝajne orumis ilin por tiaj okazoj. “Orkolora” ja ne estas erara, sed ĝi ne redonas la nocion de speciala pretigo de la ĵetonoj por trompado.

Now han’t you... Mi rimarkas, ke S.N. uzas saman parolturnon kiel mi. La nekutima vortordo iom helpas redoni la strangecon. Mi ne ŝatas “poŝteli,” cetere, pro ĝia iom malfacila kombino de sonoj—kaj pro la fakto, ke efektive oni ne ŝtelas la poŝon sed priŝtelas ĝin.”

Jen efektive la traduko kiun li preparis; ĝi ne rolis en nia unua “defio”, sed eble interesos vin vidi ĝin:

“Mi konis virinon, kiu tiel lertis ĉe iu bonulo (kiu ja ne meritis pli bonan trakton), ke dum li okupiĝis pri ŝi laŭ alia difinita maniero, ŝi transportis lian monujon, kun dudek gineoj ene, el lia horloĝa poŝeto, kien li jam metis ĝin ĝuste pro timo pri ŝi, kaj metis alian monujon plenan je orunitaj disketoj en ties anstataŭon. Fininte sian prilaboron li diras al ŝi, “Nu, vi ne priŝtelis mian poŝon, ĉu?” Ŝi ŝercis kun li, dirante, ke ŝi supozas, ke li ne havas multon por perdi; li pripalpis sian poŝeton, kaj liaj fingroj konfirmis, ke lia monujo ĉeestas, kio plene kontentigis lin, kaj tiel ŝi liberigis lian monon. Kaj temis pri komerco ŝiaflanke: ŝi kutimis teni en la poŝo falsan oran horloĝon kaj saketon de disketoj por esti preta por ĉiuj okazoj, kaj mi neniel dubas, ke ŝi praktikis sian komercon sukcese.”

Jen la sekva defio, la konata poemo “In Flanders Fields” de John McCRAE:

*In Flanders fields the poppies blow
Between the crosses, row on row,
That mark our place; and in the sky
The larks, still bravely singing, fly
Scarce heard amid the guns below.*

*We are the Dead, Short days ago
We lived, felt dawn, saw sunset glow,
Loved, and were loved, and now we lie
In Flanders fields.*

*Take up our quarrel with the foe:
To you from failing hands we throw
The torch; be yours to hold it high.
If ye break faith with us who die
We shall not sleep, though poppies grow
In Flanders fields.*

Ni taksis aparte interesa la aserton de d-ro TONKIN pri la neceso krei “stilo[n] sufiĉe distanca[n] de la kutima por doni certan guston de nekutimeco.” Prave, la lingvo de *Moll Flanders* estas sufiĉe fremda al nuntempaj legantoj. Legante la tekstojn ni devas iomete lukti inter nekutimaj literumoj kaj interpunkcio, komplikaj frazformoj, kaj malnovaj terminoj. La legado estas iom malfacila, kaj por redoni tiun saman “guston” estus interese imiti malnovan stilon (“malmemori” anstataŭ “forgesi”, aŭ “helpi al mi” anstataŭ “helpu min”). En Esperanto oni havas (konfesinde malgrandan) fonton de “malnova stilo,” sen bezono krei ion artefaritan, kiel faris KALOCSAY duonŝerce en sia eseo “La Mezepoka Esperanto.”

Ĉu tamen necesas la peno ŝajnigi tiun ĉi tekston malnova? Defoe verŝajne ne verkis *Moll Flanders* por ŝajni malnovaj aŭ antikvaj al iliaj legantoj, ĉar li skribis ne pri antikvaj reĝoj, sed pri la plej malaltaj rangoj de sia socio. La evoluo de la lingvo faris la malfacilaĵojn kaj fremdaĵojn en la teksto, ne la volo de la verkistoj. El tiu vidpunkto, traduki *Moll Flanders* por doni “certan guston de nekutimeco” ne estus plene fidela al la originala teksto, kiu ne estis aparte nekutima por la tiama legantaro.

La afero estas tikla, aparte kiam intermiksiĝas malkonsentoj pri la “volo”

aŭ “celo” de verkisto. La tasko de tradukisto estas redoni, kiel eble plej fidele, la originalon, uzante por tiu tasko alian lingvon, alian jarcenton, alian kulturan fonon, preskaŭ alian mondon. En tiu medio ne eblas fari nerompeblajn regulojn—“stilo sufiĉe distanca de la kutima” eble ne taŭgas por traduko de *Moll Flanders*, sed ĝi estus nepra por traduko de, ekzemple, “The Rime of the Ancient Mariner,” kiun verkis Samuel Coleridge per malnovaj vortoj kaj arkaikaj literumoj. Lia tiama legantaro plendis pri la malfacileco, kaj eĉ postulis glosaron en sekvaj eldonoj. La glosaroj, kiuj aperas en Esperantaj libroj, plejofte traktas novajn vortojn, ne malnovajn!

Nun, ek al la nova defio! Ni ricevis kvin traduk-proponojn. Korajn dankojn al R.T., S.L. R.W., C.O., kaj H.T.

I have undertaken: preskaŭ ĉiuj elektis formon de *entrepreni*.

you see: Jen interesa esprimo, kun diversaj provoj: *nu; nu, vidu; vidos vi; vi komprenu...* unu elektis ne trakti la frazeron. Ŝajnas al ni ke *vi komprenu* plej bone kaptas la sencon.

to write not only my life, but my opinions also: krom la elekto inter *skribi pri, priskribi, verki pri*, kaj *rakonti*, ĉiuj tradukis preskaŭ same.

Do jen la sinteza teksto, por kio Lee kaj Tim libere ŝtelis el la diversaj proponoj, tamen provante reteni iom de la komplikeco kaj stranga interpunkcio de la originalo:

“I have undertaken, you see, to write not only my life, but my opinions also; hoping and expecting that your knowledge of my character, and of what kind of mortal I am, by the one, would give you a better relish of the other: As you proceed further with me, the slight acquaintance, which is beginning betwixt us, will grow into familiarity; and that, unless one of us is at fault, will terminate in friendship—O diem praeclarum!—then nothing which has touched me will be thought trifling in its nature, or tedious in its telling.”

El *The Life and Opinions of Tristram Shandy, Gentleman*, de Laurence STERNE. Vol. I, Ch. IV

hoping and expecting that your knowledge of my character, of what kind of mortal I am, by the one, would give you a better relish of the other: En tiu ĉi frazo okazis multe da diverseco. Ni vidis, ekzemple, *esperante kaj atendente, esperante kaj anticipante, Mi esperas kaj atendas, espere kaj atende*. Oni atentu la signifon de *anticipi* (laŭ PIV:1 Uzi, alproprigi antaŭ la deca aŭ kutima tempo; 2 Fari, plenumi antaŭ la tempo; 3 Antaŭtempe imagi, elpensi)—ĝi ne taŭgas ĉi tie, kaj *atendi* estas la ĝusta verbo. Por la angla vorto *mortal* oni elektis diverse *mortemulo, homo, karnulo, mortonto, kaj mortulo*. Kaj por *relish* aperis *kompreno, aprezo, entuziasmigis, kaj frandi*. Plaĉas al ni la frazo de H.T.: *Mi entreprenis, vi komprenu, priskribi ne nur mian vivon sed ankaŭ miajn opiniojn—espere kaj atende ke via kono pri mia karaktero, kaj pri kia mortulo mi estas, rilate la unuan, ebligas al vi pli bone frandi la duan.*

As you proceed further with me: *dum vi daŭrigas pluen, dum nia kuniro, dum vi iros plue kun mi, dum vi pluen iros kun mi...* Gravas la akuzativo!

slight acquaintance: Denove interesa variado. *Eta kono, komencanta kono, iometa interkono, ekkonateco, leĝera konateco.*

“Mi jam entreprenis, vi komprenu, priverki ne nur mian vivon, sed ankaŭ miajn opiniojn; kun espero kaj atendo ke via kono de mia karaktero, kaj kia mortemulo mi estas, per la unua ebligas al vi pli bone frandi la alian: dum vi iros pluen kun mi, la malforta konateco, kiu ekestas inter ni, kreskos ĝis familiareco; kaj tio, krom se unu el ni mispaŝos, finiĝos per amikeco—*O diem praeclarum!*—kaj poste nenion kio tuŝis min oni taksos bagatela laŭ ĝia naturo, aŭ teda laŭ ĝia prirakontado.”

will grow into familiarity: *iĝos kutimaĵo, burĝonos en familiarecon, transformiĝos en familiarecon, kreskos ĝis familiareco.*

will terminate in friendship: *ni estos fine amikoj, ĉio finiĝos amikece, finiĝos en amikeco, kondukos en amikecon, finiĝos per amikeco.*

O diem praeclarum: Ĉiuj lasis ĝin en la latina formo.

Ĉiuj proponoj tradukis la tekston per pli simplaj frazoj kaj parolelturnoj, ol uzis STERNE. Kompreni la frazojn de STERNE estis pli facile per la Esperanta teksto, ol per la originalo. Plej ofte, iom simpligi la gramatikon de traduko estas ĝusta vojo. La diversaj lingvomedioj de Esperanto-parolantoj ofte postulas simplajn esprimojn kaj rektajn dirojn. Sed en *Tristram Shandy* la komplikeco de la frazoj estas gravaj. La romano estas vagado tra diversaj rakontoj, flankeniroj, kaj malveraĵoj. Tiu vagado respeguliĝas en la sintakso. Frazoj kuras preter interpunkcio kaj kurbiĝas por ŝanĝi subjekton kaj tempon. Leganto (eĉ la tiama leganto) ofte perdiĝas laŭ la vojo, kaj tio estas esenca parto de la romano ne nur stile, sed ankaŭ teme. Pro tio, ke komplikeco kaj vagademo tiom grave rolas en la temo de la romano, ne indas tro simpligi la frazojn konformi al la kutimoj de Esperanto. La kapableco de Esperanto permesi komplikajn frazlabirintojn, tamen, estas signo de la mirinda fleksebleco de nia lingvo. ★

Hazarda Esperanto



Teleroj de Sango, la marko preferita de kvar el kvin vampiroj. Kio vekas apetiton kiel sango? (Atentu: ne taŭgas por vegetaranoj.)

Fotita poŝtelefono en usona butikoj fare de Christopher ZERVIC.

Estrarkunsido, Montrealo 2008

La Estraro kunvenis je la 11-a de Julio en Montrealo, Kanado. Ĉeestantaj membroj estis: Philip DORCAS, Prezidanto; Steve BREWER, Vic-Prezidanto; Julie SPICKLER, Sekretario; Anna BENNETT, Kasisto; Jevgenija AMIS; Joel AMIS; Lusi HARMON; Robert READ; Christopher ZERVIC. Mankis al ni estraranoj Trevor ANDREWS, Anjo HARLOW kaj D. Gary GRADY. Bill HARRIS, Direktoro de la Centra Oficejo, ankaŭ ĉeestis; kaj ankaŭ Larry BENNETT, Beth DORCAS, kaj Enrike ELLEMBERG observis.

Centra Oficejo

Komence, Bill HARRIS donis raporton pri la Centra Oficejo, kiu translokiĝis glate en Januaro per helpo de Vilĉjo HARMON pri serĉo kaj negoco, kaj Doug LEONARD kaj Henry STUDER per helpo kun pakado, organizado, ktp). La nova loko estas iom malpli granda ol la malnova, kaj pro tio la arĥivoj restas en skatoloj.

Ankaŭ la nom-ŝanĝo el "ELNA" al "Esperanto-USA" okazis glate. Anna BENNETT demandis, ĉu oni uzos la novan nomon por imposton. Bill respondis "Ne, ĉar la leĝa nomo restas ELNA."

Pri la Libroservo: en Majo 2008, la kosto por eksterlanda sendado duobliĝis, tiel kiel UEA ne plu aĉetis librojn el ni; sed HARRIS diskutis kun Ionel ONET ĉe UEA, kaj ili solvis la problemon, kaj UEA ĵus mendis stokon de PMEG, la lernolibro de RICHARDSON, *Step by Step* de BUTLER, kaj aliaj libroj el E-USA. Christopher ZERVIC sugestis, ke presi librojn en Eŭropo povus eviti sendkoston.

Antaŭ jaroj, Miko SLOPER faris sonbendon por montri bonan prononcadon; HARRIS faris KD el ĝi, kaj vendas ĝin. Ĝi estas la sola usona prononc-disko vendata aktuale.

Robert READ demandis, ĉu la C.O. havas stokon de malnovaj aŭdeblaj varoj kiujn oni povus meti en MP3-formato? Philip DORCAS demandis, ĉu estus kopirajt-problemo. Bill HARRIS respondis, ke ne estas tiu problemoj, sed ke kelkaj varoj estas ne uzeblaj en modernaj sonsistemoj. Li diris, ke ni bezonas iun, kiu povos kontroli la stokon, decidi pri la valoron de la eroj, kaj reformati ilin. Steve BREWER diris, ke se la varoj estus sendataj elektronike, eble Scott REDD povus ĉerpi ilin kaj ŝanĝi ilin en MP3- kaj/aŭ KD-formaton.

Joel AMIS demandis pri la RICHARDSON-lernolibro, ĉu Fondado Glenni estas nuntempe uzata. Sekvis diskuto inter Bill HARRIS, Phil DORCAS, kaj Chris ZERVIC pri donaco de libroj al bibliotekoj, kiuj kelkfoje forĵetis ilin se oni ne uzas ilin sufiĉe ofte. DORCAS menciis, ke se oni elprenas libron el breto kaj lasas ĝin sur table, tio estas "uzo" laŭ la biblioteko; ZERVIC diris, ke bibliotekoj en malliberejoj ofte bezonas librojn.

Phil DORCAS diris, ke li ricevas mesaĝojn el Afriko kelkfoje, petante librojn kaj gazetojn. Chris ZERVIC diris, ke estus bona projekto por Ago-Tago. Kaj Bill HARRIS fine diris pri la Bulteno, ke li havas pli ol 1900 ekzemplerojn paperajn, kaj ke li preferus kolekti ilin en PDF-formato; kaj li ankaŭ donis la novan retadreson: <e-usa@esperanto-usa.org>.

Retbutiko

Steve BREWER raportis ke antaŭ jaro, li kaj Tim WESTOVER proponis novan sistemon por la retbutiko, por solvi problemojn pri sekureco kaj aliaj aferoj. La sistemo devas rekonii membrojn de E-USA, por doni al ili rabaton, kaj devas kalkuli imposton laŭ la urbo kaj loĝ-ŝtato de mendisto, kaj la send-koston, kiu varias laŭ pezo. Dum la

venontaj monatoj, BREWER kaj WESTOVER finos la laboron.

Bulteno

Prezidanto DORCAS rimarkis, ke post neformala diskuto inter la estraranoj (kaj ankaŭ kelkaj legantoj de la bulteno), la nomo nun estos "Usona Esperantisto." La novan nomon estus anoncata al la membroj dum la afer-kunsido dum la kongreso.

Retlistoj

Philip DORCAS diris, ke ni nun havas kelkajn oficialajn "Yahoo-group"-retlistojn, kiuj uzas "elna" en la nomo. Estis diskuto, ĉu estas kialo ŝanĝi el "Yahoo-groups" al alia provizanto, kaj la decido estis resti kun Yahoo.

La malnovaj listoj estas: elna-estraro; elna-libroj; aktiv-usono; elna-anoncoj; elna-retpaĝo; kaj elna-informado. Post diskuto pri la politikoj de la listoj, kaj pri kiu estos ilin, la decido estis starigi kvar novajn oficialajn retlistojn, kiuj nomiĝos: (1) eusa-anoncoj, por legi oficialajn anoncojn de Esperanto-USA; (2) eusa-gvidantoj: por la estraro, komitataj estroj, komisiistoj k.t.p. Membroj de E-USA rajtos membriĝi kaj legi, sed ne skribi en tiu-ĉi listo; la intenco estas fari la agojn de la estraro pli videblaj al la membroj ol antaŭe. (3) eusa-libroj, kiu estos por legi anoncojn pri la libroservo; kaj (4) eusa-membroj, kiu estos vera diskutgrupo, en kiu membroj de Esperanto-USA rajtos sendi mesaĝojn.

La politikoj por ĉiuj grupoj estos elsendataj en la Bulteno, kaj estos havebla ĉe la retpaĝo <esperanto-usa.org>. Bill HARRIS sugestis, ke la retlistoj havu du respondeculojn, aŭ estrojn; kaj li diris, ke la Direktoro de la C.O. bezonas liston de grupoj kaj estraroj por informi plendantojn kaj petantojn.

Amerika Oficejo

Philip DORCAS diris, ke la Amerika Komisiono de UEA diskutas planojn starigi novan Amerikan Oficejon en Meksiko por helpi esperantajn grupojn en malriĉaj landoj. La estro de la oficejo estus Martin SCHAEFFER, kiu loĝas en Meksiko kaj jam agas el sia domo por starigi la projekton. La peto por ni estas: ĉu ni subtenos la projekton po \$800 jare.

Steve BREWER diris, ke SCHAEFFER ricevas financan subtenon aktuale el UEA kaj el germana fonduso. La nuna estro de la Amerika Komisiono estas Maritza GUTIERREZ el Kubo; Martin SCHAEFFER estas tre aktiva loĝanto de Meksiko.

Lusi HARMON diris, ke laŭ ŝi li estas dediĉata persono, kies familio aldonas spacon en la hejmo por la oficejo. Sed liaj agoj en la movado en Meksiko kaŭzis problemojn; ekzemple li nun estas Prezidanto de la Meksika Esperanta Federacio, kaj siaj familianoj estas la estraranoj; tio okazis post la decido antaŭ du jaroj de MEF fari alian organizon ekster UEA, nomata Civito. Evidente en Meksiko estas historio de konflikto. Lusi diris, ke ŝi subtenas la ideon de la Amerika Oficejo, sed emfazis al Martin, ke li estu pli malferma kaj malpli sekreta.

Diskuto sekvis pri ĉu nia subteno devus iri al UEA, al la Amerika Komisiono por disdoni al Martin. Robert READ diris, ke estus bona ideo starigi nian propran fonduson, el kiu ni povus doni monon al UEA aŭ uzi alimaniere, se UEA ne subtenos la novan Amerikan Oficejon. Anna BENNETT diris, ke en la buĝeto estas \$800 en la konto 655, "Promoting Esperanto—Other" kiu estas uzebla, kaj ni povos trovi \$400 por subteni po €750 (\$1200 US).

Anna BENNETT proponis, kaj Robert READ subtenis, la proponon "that E-USA approve \$1200 for the year 2008, from account #65500, to support the Amerika Oficejo, conditional upon financial



Julie SPICKLER

Julie estas Sekretario de Esperanto-USA. Ŝi loĝas en Menlo Park, Kalifornio.

jpispickler@aol.com

support from UEA for that purpose; and that we also propose to create a fund, the Pan-American Fund, (Tut-Amerika Fonduso), to support Esperanto in the Americas." La propono estis aprobata unuanime.

Buĝeto

(According to the By-laws, the discussion of the budget must occur in English, to comply with legal requirements for corporations.) The budget for 2009 was presented by Anna BENNETT, Treasurer. The budget shows increases over the 2008 budget in Convention Income (because it will be held in the U.S. and not shared with another organization) and the related Convention Expenses, a decrease in Catalog Sales and related Expenses, an increase to the Promoting Esp-Other account (to reflect the possible donation to the Amerika Oficejo and/or to the Pan-American Fund "Tut-Amerika Fonduso"), an increase to the Salaries account (to reflect a 5% increase in the Director's Salary), and an increase to the Rent Expense account (to reflect the increased rent at the new location). Steve BREWER proposed that the Board accept the 2009 budget and recommend it for approval by the members; Anna BENNETT seconded the proposal, and the proposal was passed unanimously.

Anna also mentioned that people who have contributed to Esperanto-USA during the year should be thanked for their support; Phil DORCAS said that he would undertake this project.

Raportoj al la Estraro kaj Membroj

Bill HARRIS demandis, ĉu la komitataj raportoj traktas la laboron de la kalendara jaro aŭ la jaro inter kongresoj; Phil DORCAS respondis, ke la UEA-kaj raportoj estas por la kalendara jaro, kaj Bill diris, ke ni faros same venontjare.

Komitatoj

Phil DORCAS petis 2 volontulojn por helpi la Direktoron kalkuli la balotojn post la Distra Vespero; Robert READ kaj Julie SPICKLER volontulis.

Phil ankaŭ diris, ke la Kondatiga Komitato bezonas novajn membrojn; la estraranoj sugestis nomojn de homoj, kiuj taŭgos kaj eble konsentos servi, kiujn li kontaktos.

Pasporto al la Tuta Mondo

Lusi HARMON raportis, ke ŝi ricevis bonajn respondojn el uzantoj de *Pasporto*, precipe el Japanujo, kie ili diras, ke ili ne ofte havas ŝancon aŭdi parolatan lingvon. Ŝi diris, ke oni uzas ĝin ĉe NASK, kaj ankaŭ ĉe la Universitato de Kalifornio ĉe San-Diego, por la eksteruniversitataj kursoj, kaj ĉe UK de Santa-Barbara kaj UC Davis. Ŝi demandis, ĉu helpus se ĝi estus havebla sur la reto, kaj ili jesis. Ŝi diris, ke ŝi volonte metos Lecionon Unu sur la reto, sed oni devus pagi por la resto.

Robert READ asertis, ke se Pasporto estus havebla ekz. ĉe YouTube, centoj (aŭ pli) da homoj lernus Esperanton—sed ni ne scius, ke ili faris. Chris ZERVIC sugestis, ke, ĉar YouTube montras nur 10 minutajn filmojn, oni montru mallongan parton ĉe YouTube kaj diri ke estas plu, videbla ĉe esperanto-usa.org. Estus bona reklamo, kaj oni ankaŭ povos uzi iTunes kiel vendejan lokon.

Lusi diris, ke *Pasporto* estis kreita por grup-uzo pli ol por individuoj, ĉar ŝi opiniis, ke estas pli bone krei grupojn da esperantistoj, ol individuojn.

Bill HARRIS demandis, ĉu la du instru-disko kun ekzercoj, teksto, ktp ankaŭ estus helpa, se ili estus surrete kun la 16 lecionoj.

Steve BREWER diris, ke li lernis pri Corey DOCTOROW, verkisto, kiu traktis, kio okazas kiam oni disdonas informon libere interrete. Li fanfaronas la ideon kiel metodo varbi interesajn homojn. Laŭ Steve, se ĝi estas havebla, ju pli homoj ekscias pri ĝi, des pli ili lernos.

Anna BENNETT demandis, ke se la tuta kurso estus havebla interrete, ĉu oni aĉetus ĝin? S-ro BREWER diris, ke s-ro DOCTOROW trovis pli da vendoj (de sia libro) ol li perdis, kiam li metis ĝin senkoste sur la Interreton. Jenja AMIS komentis, pri la ebleco pirati ĝin, kaj Joel AMIS diris, ke eĉ se estas ideala, studi/lerni en grupo aŭ klasĉambro, pli bone lerni sole ol ne lerni. Laŭ Bill HARRIS, verŝajne neniu, kiu spektos la kursan rete, fakte sekvas la tutan programon. Sed estos prezentado al la lingvo, kaj reklamo; kaj eble tio helpas la vendadon de *Pasporto*.

La fina decido kion fari restas ĉe Lusi HARMON.

Pro manko de tempo, la kunsido estis fermata ĉirkaŭ la 18-a horo.

Afer-Kunsidoj, Montrealo 2008

La unua E-USA aferkunsido dum la 2008 Landa Kongreso okazis sabaton, la 12-an de Julio. Ĉirkaŭ 20 membroj, krom la estraranoj, partoprenis la kunvenon.

Prezidanto DORCAS raportis al la membroj, ke pro la nomŝanĝo de la organizo, la oficialaj retlistoj ankaŭ havos novajn nomojn, kaj aliaj ŝanĝojn. La novaj listoj estos: eusa-membroj, eusa-anoncoj, eusa-libroj, kaj eusa-gvidantoj (la lasta estos nova formo de elna-estraro). Li eksplikis, ke la "elna"-formo de la listoj daŭros ĝis la fino de la jaro, kaj poste ili ne plu estos uzataj. Necesos, ke iu kiu volas partopreni la novajn listojn devos realigi. La politiko por la novaj listoj estos eldonataj en la bulteno kaj rete.

Ron GLOSSOP informis la grupon pri la 2009 Landa Kongreso, kiu okazos en Sankta-Luiso la 22-an ĝis la 25-an de Majo 2009. Ron rekomendis *Southwest Airways* por malaltkostaj flug-biletoj, kaj diris ke la hotel-ĉambroj estos ne altkostaj.

Steve BREWER raportis pri la retbutiko, ke ĝi renoviĝas al pli simpla sistemo. Li ankaŭ proponis "retfeston," simile al tiu, kiu okazis por la retpaĝo, je la komenco de la nova jaro.

Roberto READ raportis, ke la \$4000 en la 2008 buĝeto por reklamo de Esperanto ne estis elspezata.

Phil DORCAS raportis pri la nova Amerika Oficejo kaj la aprobo de la estraro subteni ĝin finance, nur se UEA ankaŭ faros.

The report on the budget was in English, to prevent confusion or misunderstanding. Phil DORCAS said that the budget is now for the calendar year, to conform with the fiscal year for UEA and other Esperanto groups, and Anna BENNETT pointed out that the shortened year appears in the Jarraporto. The budget is for approved expenses for the coming year; but if needed, unbudgeted expenditures can be made. The two main changes in the budget are the 5% increase in the salary for the Director of the Central Office, and the payment of funds from account #65500 to the Amerika Oficejo.

Discussion of the budget was deferred until the Afer-kunsido on the next day.

Doroteo HOLLAND demandis, ĉu estis komentoj pri raportoj en la Jarraporto. Lusi HARMON raportis, ke *Pasporto al la Tuta Mondo* havas novan belan kovrilon, kaj ke post la diskuto en la estrar-kunsido ŝi decidis meti *Pasporto*-on senkoste en la Interreton. Ron GLOSSOP raportis pri bezono por alia membro (laŭ statuto) por la Fonduso Schulze, kaj ke en la bulteno de la AAIE estos reklamo de havebla subvencio por NASK el la Fonduso. Li ankaŭ diris, ke Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo sendis esperantajn lern-materialojn al instruistoj en Afriko, kaj li dankis Enrike ELLEMBERG pro lia helpo en la ret-paĝaro. Lusi HARMON menciis, ke pri retpaĝoj, Ed WILLIGER faris grandan laboron por savi paĝarojn de Don HARLOW, kaj ke Tim WESTOVER helpas ĉerpi gravajn materialojn.

Doroteo HOLLAND diris, ke kiel skribita en la Jar-raporto, la Perkoresponda Esperanto-Kursaro daŭras, kaj ankaŭ la Usona Ekzamena Servo sukcesas daŭri.

Karena KLAHR raportis por la Membreca Komitato, ke ŝi kaj Bill HARRIS elsendis retmesaĝojn al iuj, kiuj respondis al la realiĝaj demand-leteroj kaj al iuj kiuj demandis informon dum la jaro. Ŝi havis du petojn: por helpo en la komitato, kaj ke individuoj kuraĝigi interesantojn membriĝi. Anna BENNETT demandis, kiom da homoj realiĝis post ol la retmesaĝoj, kaj Bill HARRIS diris pli/malpli 30. Bill ankaŭ menciis, ke ni ŝanĝis la sistemon tiel, kiel membreco estas dum 12 monatoj, kiam ajn dum la jaro oni membriĝas. Sed membreco en UEA ankoraŭ estas dum kalendara jaro. Doroteo HOLLAND demandis, ĉu la C.O. sendos leteron je decembro, kiel antaŭe, kaj Bill jesis.

Phil DORCAS rememorigis la partoprenantoj, ke dum la neksta kunsido ni devos aprobi la buĝeton, kaj havos tempon diskuti aliajn aferojn.

Dua Kunsido: dimanĉon la 13-an de Julio

Phil DORCAS malfermis la kunsidon per tagordo: Rezulto de voĉdonado, Diskuto kaj akcepto de raportoj, Diskuto kaj aprobo de la buĝeto, kaj Diskuto pri la Amerika Oficejo.

Li komencis per raporto pri rezultoj de la voĉdono: Prezidanto, Philip DORCAS; Vic-Prezidanto, Tim WESTOVER; kaj Estraranoj, Mar CARDENAS, D. Gary GRADY, kaj Elizabeth DORCAS. Beth tuj rezignis la postenon, dirante, ke ŝi preferas helpi Phil ne-oficiale, kaj tial Leland (Haruo) ROSS estas la tria nova estrarano. Ron GLOSSOP demandis kiuj estas la aliaj estraranoj, kaj Phil respondis per la ĉeestantoj kaj ankaŭ Trevor ANDREWS kaj Anĝela HARLOW. La Prezidanto tiam demandis, ĉu estas demandoj, komentoj aŭ ŝanĝoj al la raportoj. Neniu estis, kaj Lusi HARMON proponis, ke la raportoj estu akceptataj, kaj unuanime ili estis.

Phil DORCAS tiam legis la proponon el Martin SCHAEFFER pri la Amerika Oficejo en Meksiko, kies celo estus "plifortigi la esperantan movadon en la malriĉaj landoj de la amerika kontinento (t.e., Ameriko sen Argentino, Brazilo, Kanado, Kubo, Urugvajo, kaj Usono), ĉar la movado kompare al aliaj mondregionoj estas ekstreme malforta kaj ĝi meritas nian specialan atenton." Specifaj taskoj estas i.a.: interna trejnado de amikaj aktivuloj; informado (ĉefe en hispanparolantaj landoj, kreo kaj plibonigo de presita informmaterialo); helpo ĉe la kreo de retpaĝoj pri Esperanto en la unuopaj landoj; instruado de Esperanto (perrete aŭ per organizado de kursoj); organizi seminariojn por instrui instruistojn; subteno de la laboro de

volontuloj en la diversaj landoj; eldono de gazeteto aŭ novajletero pri la Esperanto-agado en Ameriko; kaj multe aliaj projektoj. La propono, kiun aprobis la E-USA estraro por subteni tian Amerikan Oficejon estas (angle): *that Esperanto-USA approves \$1200 for the year 2008, to support the Amerika Oficejo, the funds to come from account #65500, conditional upon financial support by UEA for the Amerika Oficejo; and the Board also approved the proposal to create a foundation, the Pan-American Fund, (Tut-Amerika Fonduso), to support Esperanto in the Americas.*

La sekva diskuto temis pri la organizo de la Oficejo, kiu havos du dungitojn, ambaŭ parencoj de SCHAEFFER (kaj la loko de la oficejo estos en lia domo), kaj nia deziro helpi kaj ne tro ŝajni regi la aferon. Dum la diskuto, Ron GLOSSOP proponis dividi la originalan proponon, tiel kiel la subteno de Amerika Oficejo kaj la kreo de nova fonduso estu aparte; Lusi HARMON subtenis. Post diskuto, per voĉdono la propono restis ne dividita, kaj post diskuto de detaloj (kiam kaj kiel informi s-ron SCHAEFFER de nia subteno), la elekto de la membroj estis subteni la proponon.

La sekvanta temo estis la buĝeto. La fakto estas ke kutime E-USA en la pasinteco rutine diskutis financojn por la angla lingvo pro tio ke ni estas Usona korporacio, kaj la protokoloj pri financaj aferoj do devus esti en la angla. Temas pri leĝo. Anna BENNETT explained various items, and there were no questions. Ron GLOSSOP moved to accept the budget, John GOODHAND seconded the motion, and the members voted to approve it, with two abstentions.

Ne estis alia afero, kaj la kunsido estis fermata.

Tria Kunsido: Solena Fermo London, la 14-an de Julio

La ĉefa afero de la fina kunsido estis verki rezolucion por danki la LKK-on de la Landa Kongreso kaj de TAKE, kun kiu ni kunkongresis. Phil DORCAS legis rezolucion por danki al: Boris-Antoine LEGAULT, Normand FLEURY, Zdravka METZ, Edmond BRENT, Cora BRENT-PALMER, Martin BENOIT, Thomas LAFONTAINE, Yan LAVASSEUR, Steve BREWER, Lusi HARMON, Jim HENRY, la LKK, Esperanto-UQAM, kaj la Esperanto-Societo Kebekia. Lusi HARMON proponis la akcepton de la rezolucio, Thomas ECCARDT subtenis, kaj ĝi estis aprokata unuanime.

Wally DU TEMPLE sugestis, ke ekzemplero de la bulteno estu sendota al la nomitaj personoj, kaj Bill HARRIS diris ke li petos sufiĉajn kromajn ekzemplerojn por sendi al la E-Societo Kebekia, por ke ili povos sendi ilin al individuoj. Lusi sugestis, ke ni legos la rezolucion ĉe la solena fermo de TAKE, kaj Phil diris, ke li faros. La sugesto de Wally estis formala propono, kiu Ron GLOSSOP subtenis, kaj ĝi estis unuanime aprokata.

Aliaj aferoj estis: Phil DORCAS legis liston de la novaj estraranoj, por iuj, kiuj ne ĉeestis la pasintan afer-kunsidon; kaj Ron GLOSSOP invitis ĉiujn al la venonta landa kongreso en Sankta-Luiso, okazante la 22-an–25-an de Majo en 2009, en la sama hotelo, kie ĝi okazis en 1999. Alan BOSCHEN menciis, ke la hotelo havas Esperantan historion: li partoprenis sian unuan kongreson tie, en 1968.

Lusi HARMON menciis la bonan influon por Esperanto en Kanado, ke ni kunkongresis: pli da kanadanoj partoprenis sian landon kongreson, ol iam ajn. Ŝi, kaj Karna KLAHR, demandis, kiom da usonanoj partoprenis, kaj Phil DORCAS diris ke estis simile al kutima landa kongreso; sed kelkaj el Usono ĉeestis NASK-on, kiu okazis samtempe.

Phil DORCAS tiam deklaris, ke la 2008 Landa Kongreso estas fermata. ★

La mirinda rakonto de la bitum-pupo

Eksperimenta traduko de konata usona verko en dialekto, fare de George BAKER.

“Ĉu la vulpo neniam ne kaptis la leporon, Onklo Remo?” demandis la knabo la sekvantan vesperon.

“Li 'stis terure proksim' al tio, kara, certe ki'l via naskidj'—ja tion far's Frato-Vulp'. Iun tag' pos' kiam Frat-Lepor' tromp's lin pri tiu kalam-radik', Frato-Vulp' ek's labori, kaj havig's al si i'm da bitum', kaj miks's tiun ku' i'm da ter'bintin', kaj li ekfar's aferon, kiun li nom's Bitum-Pup', kaj li pren's ĉi Bitum-Pup'n, kaj sidig's ŝin en la ŝose', kaj tiam kuŝ's sin for en l' arbustoj por ekvidi ki'l statos l' afer'. Kaj li eĉ ne dev's multe atendi, ne, ĉar i'm-pos'-i'm jen ven's Frat-Lepor' trotanta laŭ la voj' tik-tik, cak-cak, djuste 'pertinenta ki'l garol'. Frato-Vulp' li subig's la kap'n. Frat-Lepor' ven's prance laŭvoj' djis li spekt's la Bitum-Pup'n, kaj tiam li pren's sin alte sur l' maltant'ŭaj kruroj, kvazau lin frap's mir'. L' Bitum-Pup', ŝi nur sid's tie, far's ŝi, kaj Frato-Vulp', li subig's la kap'n.



“Bo' maten'! dir's Frat-Lepor'”, li dir's.—'bela veter' ĉimaten', li dir's.

“Bitum'-Pup' ne diras nenion, kaj Frato-Vulp', li subigas la kap'n.

“Ki'l viaj simtomoj sentidjas?’ dir's Frat-Lepor', li dir's.

“Frato-Vulp' li palpebrum's lante, kaj subig's la kap'n, kaj la Bitum-Pup', ŝi dir's nenion.

“Ki'l statas al vi, do? Ĉu vi surdas?’ dir's Frat-Lepor', li dir's. ‘Ĉar se jes, mi povas lautkrii, lau bezon', li dir's.

“Bitum-Pup' kviet's, kaj Frato-Vulp', li subig's la kap'n.

“Vi 'stas 'rgojla, jen ki'l vi 'stas,' dir's Frat-Lepor', li dir's, 'kaj mi 'tencas kuraci vin, jen mi faros,' li dir's.

“Frato-Vulp', li 'ligis rikan'n en stomak', li far's, sed Bitum-Pup' ne diras nenion.

“Mi 'tencas 'strui vin ki'l paroli al l' homoj r'spektindaj, se 'stos l' last' agad' dir's Frat-Lepor', li dir's. ‘Se vi ne levos la ĉapel'n kaj diros s'luton, mi 'tencas krevbati vin plenaperte,' li dir's.

“Bitum-Pup' rest's kviet' kaj Frato-Vulp', li subig's la kap'n.

“Frat-Lepor' d'mandad's al dji, kaj la Bitum-Pup' daure silent's, djis jenfine Frat-Lepor' tir's streĉe sian pugn'n, far's li, kaj pam, bat's ŝin ĉe l' flank' de kap'. Jen tiam li elkruĉig's la melas'n. Lia pugn' algluid's, kaj li ne pov's tiri djin liber'. La Bitum-Pup' nur ten's lin. Sed la Bitum-Pup' restad's kviet', kaj Frato-Vulp', li subig's la kap'n.

“‘Se vi ne lasos min liber' mi frapos vin denov',’ dir's Frat-Lepor', li dir's, kaj jen li port's al ŝi sving'n per l' dua man', kaj tiu algluid's. Bitum-Pup', ŝi ne diras nenion, kaj Frato-Vulp', li subig's la kap'n.

“‘Las' min liber', au mi piedbato el vi la 'nternojn,' dir's Frat-Lepor', li dir's, sed la Bitum-Pup', ŝi ne dir's nenion. Ŝi nur tenad's, kaj tiam Frat-Lepor' perd's l'uzon de siaj piedoj samki'l. Frato-Vulp', li subig's la kap'n.

Tiam Frat-Lepor' elkriĉ's, ke se la Bitum-Pup' ne lasus lin liber', li kap'frapus ŝin kurbige. Kaj tiam li kapfrap's, kaj jen kaptid's lia kap'. Tiam elpromen's Frato-Vulp' 'spektante senkulpa, djuste ki'l unu el la mimbirdoj de via patrin'.

“S'luton, Frat-Lepor', dir's Frato-Vulp'’, li dir's. ‘Vi 'spektas i'm okupat' ĉimaten', li dir's, kaj tiam li rul's sur ter'n, kaj li ridad's kaj ridad's djis li ne pov's ridi ne plu. ‘Mi s'pozas, ke vi vespermandjos ku' mi ĉifoj', Frat-Lepor'. Mi ja havig's al mi i'm da kalam-radik', kaj mi ne 'ceptos nenian 'skuz'n,' dir's Frato-Vulp', li dir's.”

Tiam pauszis Onklo Remo, kaj tiris el la braĝo kilogrampezan bataton.

“Ĉu la vulpo manĝis la leporon?” demandis la knabo al kiu rakontiĝis la historieto.

“Jen ki'm longe dauras la rakont',” replikis la oldulo. “Eble li ja far's, kaj eble li ne far's. Iuj diras, ke Judjist' Urs' ven's promene kaj liber's li—iuj diras, ke li ne far's. Mi 'skultas M'strin'n Sali voki. Vi devas eki.”

Fonto: “The Wonderful Tar Baby Story” el *Uncle Remus; Legends of the Old Plantation* (1881) de Joel Chandler HARRIS.

Ho... jen nova enigmo! Inter la solvontoj ni lotumos unu premion: \$10 da rabato ĉe la libroservo de Esperanto-USA. Ĉiuj membroj rajtas partopreni. **Via solvo alvenu al la redakcio (aŭ poŝte aŭ rete) antaŭ la 20-a de Novembro.** Bonan solvadon!

Horizontale


- 1 Ekkrio pensema
- 4 Malmontri
- 9 Ekkrio bedaŭra
- 12 "Al la buŝo de ' ___ ' neniuj povas ordoni."
- 13 Objekt' ofte ŝanĝita en ŝercoj
- 14 "Sen speso unua ne ekzistas la ___."
- 15 Maltrankviligoj, konfuzoj, embarasoj
- 18 Taĉment' de soldatoj
- 19 Malvira
- 22 Liptuŝ'
- 23 Kondukil' por sentumoj
- 26 Sent' post pommanĝo?
- 28 Gume fiksi
- 29 Mallasta
- 30 Ceremoni', ofte religia
- 33 Koncept', pensaj'

- 34 Ŝuŝmiraj'
- 37 Taŭga nomo por tiu ĉi enigmo?
- 42 "Kontentigi ĉiujn ___ anĝelo ne povas."
- 44 Metalaj kunfiksoj
- 45 Verda marĉbestet'; kun ti-, fariĝas despoto?
- 46 Revoluciisto, prepozicio
- 47 Lernantaro
- 48 "Kie regas konkordo, regas ___o."

Vertikale

- 1 Kurbigita, pinta il' por tiri aŭ pendigi
- 2 Sinsekvo post L
- 3 Fosaj' kie troviĝas metaloj aŭ mineraloj
- 4 "Ne venas rato mem al la ___o."

- 5 Tut-___a Kongreso de Esperanto
- 6 Stimuli per metala pikilo
- 7 "Kiu ___ nenion, ne timas Dion."
- 8 Instrumento aŭ aparato
- 9 Sufikso daŭriga
- 10 Korneca piedbaz' (ekz. de ĉevalo)
- 11 Ekkrio surpriza
- 16 Kvadrata ludej' por 32 batalantoj
- 17 Ĵetanta kaj rekaptanta amuzist'
- 20 Levmaŝino, eble birdaspekta
- 21 "Vi amas preni, amu re ___."
- 24 "___ aero al tero."
- 25 Ĝi troviĝas rekte sub XII
- 26 Ekkrio incita
- 27 Enkonduka interjekcio, eble jiddevena



- 30 Hom' kiu havas multan monon
- 31 Stultega, kretena
- 32 Varmbotel'
- 35 Grup' de posteuloj
- 36 Sufikso esprimanta malbona kvalito
- 38 Granda, remaĉa mamul' kiu parencas al cervo
- 39 Loko por io
- 40 Ĥemia elemento № 79
- 41 Revuo: La ___o de Esperanto
- 42 Sufikso esprimanta staton, kvaliton
- 43 Ekkrio alvoka

Solvo de la enigmo el numero 2008/4

1	S	P	A	D	O		6	S	A	T	U		14	L	A	M	P
14	O	R	G	A	N		15	A	Z	I	L		16	I	D	O	L
17	P	E	R	S	I	S	T	E	M	O		18	B	O	N	E	
20	I	M	A	G		21	T	A	N	I		22	B	E	R	O	J
23	R	I	F	U	G	A	S				24	K	A	R	A		
			26	P	U	L		27	D	E	A	T	E	N	D	O	30
31	L	A	K	T	O		32	K	R	A	Ĉ	U		34	T	U	R
36	A	K	R	A		37	R	U	I	N	O		38	R	O	B	O
39	I	V	O		40	M	O	R	N	A		41	F	I	N	O	N
42	K	O	M	P	A	N	I	O		43	G	I	B				
		44	V	E	R	D		45	S	E	N	E	G	A	S	46	
50	S	P	I	K	O		51	T	E	A	M		52	L	I	M	O
54	A	E	R	A		55	M	A	L	L	I	B	E	R	A	N	
58	B	R	I	D		59	E	B	L	I		60	A	M	A	S	O
61	L	I	N	O		62	S	L	A	V		63	T	A	S	O	J

Gajnintoj de la lotumado: **Dave RUTAN, Arnold VICTOR.**
 Kaj gratulon al niaj aliaj ludantoj: George BAKER, Darlene F. EVANS, Bill HARMON, Arlyn KERR, E. James LIEBERMAN.



Dankon denove al la talenta Rex MAY. Vizitu lian retejon ĉe baloo.com. —Red.

Remember: your membership ends on the date specified in the first line of the address listed above. Don't forget to renew!

Ni ĝojas esti strangaj aŭ frenezaj

MONTREALO, Kanado—Raporto de la membrokomitato de la Esperanto-Klubo de Kodiako: ankoraŭ sole mi.

Bonflanke, tio signifas ke ni bezonas nur unu novan membron por atingi kreskon de cent elcentoj. Aliflanke, ĝi ankaŭ signifas ke nun ni estas tute sen estro, ĉar la tri-jara deĵorolimo malpermesas min denove kandidati al la prezidanteco.

Intertempe, kiel foririnta prezidanto, mi estas en Montrealo por ĉeesti la 7-an Tut-Amerikan Kongreson de Esperanto (TAKE) kune kun pli ol 200 aliaj partoprenantoj el Usono, Kanado, Kubo, Gvatemalo kaj aliaj landoj, eĉ el Eŭropo kaj Azio.

Esperanto estas lingvo intence elpensita—kiel la klingona lingvo, sed sen kostumoj. Pola okulisto Ludoviko ZAMENHOF kreis ĝin en la jaro 1887 kiel facile lerneblan duan lingvon, kiun ĉiuj povus uzi por faciligi universalan interkompreniĝon kaj tutmondan pacon.

Se vi travivis la 1960-ajn jarojn kaj vi ne estis tro narkotiĝinta, verŝajne vi memoras la ideon de tutmonda paco. Ĝi supozeble realiĝus per neniam hartondado kaj telekineza ŝvebigo de registaraj konstruaĵoj. Kiel infano de la 1970-aj jaroj, de Nov-Ĵerzejo dum jardekoj, mi konas tutmondan pacon nur kiel respondon dum la intervjuo parto de la beleco-konkurso “Miss America.”

Laŭ ĉiuj, estas bedaŭrinde ke la civitanoj de Tero ne pli enfokusigas la komunajn korsentojn, kiujn ni ĉiuj kune havas—ekzemple zorgon pri malriĉuloj kaj

malsatuloj, maltrankvilon pri la ekosistemo, aŭ malŝaton de George W. BUSH. ZAMENHOF opiniis ke konflikto okazus malpli ofte, se homoj povus almenaŭ pli facile komunikiĝi.

Pesimisto eble atentigus, ke konfliktoj foje okazas eĉ inter homoj kiuj parolas la saman lingvon, verŝajne ĉar ili tro bone komprenas unu la alian. Sed Esperanto ne okupiĝas pri pesimismo.

“**Ni kodiakanoj povus utile uzi ĝin kiel facilan ponton inter la angla, la filipina, la hispana—kaj tiu volapukaĵo, kiun tajpas la junuloj per siaj poŝtelefonoj.**”

Esperanto, kiel internacia lingvo, estas unu el tiuj evidente bonaj ideoj kiuj bone funkcias se la homoj nur penus malmulte hodiaŭ por eviti multe da mon-malŝparo kaj kapdoloro poste, simile al ideoj pri nacia sanservo aŭ publika transportsistemo. Ĉar oni ŝajne kontentas pri tio, ke niaj profesiaj sanservistoj pasigas la plejparton de sia tempo plenskribante formularojn anstataŭ kuracante pacientojn, mi decidis elspezi mian “kontraŭventomuelilan” energion por ĉi tiu monda lingvo. Ni kodiakanoj povus utile uzi ĝin kiel facilan ponton inter la angla, la filipina, la hispana—kaj tiu volapukaĵo, kiun tajpas la junuloj per siaj poŝtelefonoj.

Nun, nur 121 jarojn poste, nia celo estas videbla. Je la nuna rapideco de disvastiĝo de la Esperanto-movado, ĉiuj en la mondo parolos ĝin ne post la jaro 6011485, plus-minus miliono, supozante neniom da kresko de la monda loĝantaro kaj la tutan

malaperon de usonanoj. (Ni jankioj neĵ multej ŝatas paroŭli fremdlingvej.)

Do eble ni esperantistoj estas optimismaj frenezuloj. Fakte, la frenezuloj ofte ĝustas kiam temas pri “mi tion diris al vi.” Kiel mi vidis en Montrealo, nia elpensita lingvo vere funkcias. Esperantistoj konversacias normale, prelegas, verkas librojn, kaj amikiĝas kun homoj de aliaj landoj.

Kaj mi menciuj la subtenantojn: Robert BADEN-POWELL, fondinto de la skoltismo, rekomendis ĝin. La religio Oomoto en Japanujo postulas ke membroj lernu ĝin, kaj la usona armeo antaŭe uzis Esperanton dum militoludoj kiel “lingvon de la malamiko.” Hitler nomis ĝin juda konspiro, samkiel demokration aŭ ĵurnalistan liberon.

Parenteze, Montrealo ankaŭ estas hejmo de la profeto Raĉl, kiu en la jaro 1973 anoncis ke eksterteruloj kreis la homaron antaŭ 25 000 jaroj. Niaj eksterteraj prapatroj diris al li, ke ni devas adopti komunan lingvon por la tuta mondo—sed strange, ili ne specife menciis Esperanton. Cetere, ili diris ke ni devas kloni nin por vivi eterne, kaj neniam tondi la hararon, ĉar ĝi funkcias kiel anteno por telepatio kun la eksterteruloj.

Parolante pri Klingonoj kaj Kanado, en la unua plenlonga filmo farita en Esperanto ĉefrolis la kanada aktoro William SHATNER, antaŭ ol li fariĝis Kapitano Kirk. Eble estas tro optimisme atendi tiun aferon de tutmonda paco, sed se vi lernos Esperanton, eble ankaŭ vi povos aktori kiel freneza korporacia advokato en televidprogramo kaj tiel gajni *Emmy*-premion.

Traduko de anglalingva artikolo kiu aperis en la ĵurnalo *Kodiak Daily Mirror* en Kodiak, Alasko. Ĝin verkis (kaj kuntradukis) E-isto Drew HERMAN.